# NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)
TTT-ejo: esperantobilbao.tk

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
esperantobi@gmail.com

**Jar-kotizoj**: Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**NOVEMBRO/DECEMBRO 2013** **Nro. 97 (4/13)**



**Ludwik Lejzer Zamenhof**
**(Białystok, 15/12/1859 – Warszawa, 14-04-1917)**

*Como ya es tradición, alrededor del 15 de Diciembre, los esperantistas de todo el mundo acostumbran reunirse para recordar el aniversario del nacimiento del creador del Esperanto.*

*También en Bilbao nos vamos a reunir: el **sábado 14 de Diciembre**, a partir de las **19:30 h**.*

*Os esperamos a todos: socios, familiares, simpatizantes, amigos, ...*

## LOKE ...

## Z-FESTOTAGO.

Kiel tradicie, ĉirkaŭ la 15-a de decembro, esperantistoj en la tuta mondo kuniĝas por celebri la naskiĝtagon de la kreinto de Esperanto.

Ankaŭ en Bilbao ni same faros. La **sabaton 14-an de decembro**, ekde la **19-a h.**, ni renkontos geamikojn, interparolos en Esperanto kaj **kunmanĝos la frandaĵojn alportitaj de la ĉeestantoj**.

Ni atendas vin ĉiujn: asocianoj, familianoj, simpatiantoj ,geamikoj, …

## KRISTNASKA LOTERIO.

Ĉu vi jam aĉetis la loteribiletojn de nia E-Grupo? Ne atendu ĝis la lasta momento ĉar pasintjare ili elĉerpiĝis. Poste ne plendu!




io. Ili aĉeteblas en nia sid

*¿Ya has comprado los billetes de lotería del Grupo? No lo dejes para el último momento, que el año pasado se agotaron y más de uno se quedó sin ellos. Luego, que no vengan los lamentos.*

## CUOTAS DEL AÑO 2013.

Si a la izquierda de estas líneas aparece una cruz roja, es que no has pagado la cuota de socio del presente año 2013. Dadas las dificultades económicas por las que atraviesa el Grupo, a causa de la colocación de un ascensor en el inmueble, te rogamos que la hagas efectiva a la mayor brevedad posible.

Te recordamos que las cuotas vigentes son:

Cuota normal: 30,00 euros anuales.
Cuota reducida: 15,00 euros anuales.
Cuota familiar: 45,00 euros anuales.

¡¡Muchas gracias por tu colaboración!!

## INTERVJUO EN “Radio Euskadi”.

La pasintan 31-an de oktobro, nia sekretario, Jesús M. García, estis intervjuata de la tre konata ĵurnalisto kaj vojaĝemulo Roge Blasco en la programo “La domo de la vortoj”, en radio “Euskadi”. Dum duonhoro eblis paroli pri la apero de Esperanto en nia regiono, pri la E-Grupo de Bilbao, pri la lingvo mem, pri Esperanto kiel ilo por vojaĝoj, ktp.

En la sama programo, per teléfono, el Zaragozo, estis ankaŭ intervjuata José Manuel Gonzalez, kiu verkis la romanon “La forgesitoj de la malvarmo”, en kiu grave rolas Esperanto; unu el la ĉefaj roluloj nomiĝas Alexander Zamenhof kaj ĉe la frontpaĝo, apud la titolo, aperas frazo en Esperanto.

## INTERVJUO EN “EL CORREO”.

La 22-an de novembro vizitis nian sidejon Carlos Benito, ĵurnalisto de la plej grava ĵurnalo de Bilbao, nome, “El Correo”. Li intervjuis nian sekretarion, Jesús Miguel García. La intervjuo, tutpaĝa kaj kung randa kolora foto, aperis la sabaton 30-an de novembro.

## BILBAOA E-POETO PREMIITA.

Nia amiko **Alberto García Orive** ricevis la 3-an premion por poezio en la Internacia Literatura Konkurso EKRA-2013. EKRA es akronimo de Esperantista Krea Renkontiĝo “Abritus”. La evento okazis en la urbo Razgrad (Bulgario).

## Nacia premio de teatro al Ramón Barea.

La ĉijara Nacia Premio de Teatro de la Ministerio pri Kulturo estis atribuita al Ramón Barea. Memoru: li estas la reĝisoro de "La pedalaŭto", kies ĉefrolulo parolas Esperanton.
http://cultura.elpais.com/cultura/2013/11/26/actualidad/1385475376_819378.html

*(Toño del Barrio. 26/11/2013)*

NOTO: *Ni povas aldoni ke Ramón Barea estas bilbaoano kaj ke la iama membrino de nia E-Grupo, Nati Ortiz de Zarate, apartenis (ĉu ankoraŭ apartenas?) al lia teatra trupo. Interalie, ŝi aktoris en la fama filmo “La morto de Mikel”, same kiel Ramón Barea mem*.

## Eŭska vortaro.

Mi aldonis al la arĥivejo de nia forumo la vortareton Esperanto-Eŭska-Esperanto de la franca esperantistino Dominik Cornice. Oni povas ĝin konsulti aŭ elŝuti el: http://es.groups.yahoo.com/group/iberia-esperantistaro/files/

*(Darío Rodríguez. 22/04/2013)*

***La Grupo Esperantista de Bilbao deziras al ĉiuj siaj membroj, amikoj kaj simpatiantoj sukcesan kaj ĝojigan jaron 2014. Estu feliĉaj!!!***

**H.E.F.**

## 73-a Hispana E-Kongreso.

De la 1-a ĝis la 4-a de majo 2014, en Ronda (Málaga).

*Informoj: andaluciaesperanto.blogspot.com*
*Temo de la kongreso: Esperanto kaj flamenko.*
*La unua aliĝperiodo, kun rabatitaj kotizoj, finiĝas la 31-an de januaro 2014*.

## "Nubico" nova bitlibra servo de Telefónica.

En la raporto de "El Diario" pri tiu nova servo, la ĵurnalisto asertas ke la nomo, "nubico", venas el Esperanto kun la signifo "en la nubo" (tiel!!). Ejn??????
http://www.eldiario.es/turing/Nubico-Telefonica-Circulo_de_lectores-suscripcion-ebook iOS-Android_0_184432449.html

*(Manuel Pancorbo Castro. 11/10/2013)*

## NUMERO "0" DE LA BIT-BULTENO DE HEF.

Hispana Esperanto-Federacio lanĉis hodiaŭ la unuan (provan) numeron de sia nova retbulteno. Vi povas legi ĝin en la adreso:
http://esperanto.es/hef/index.php?option=com_jnews&act=mailing&task=view&mailingid=11

Ni esperas ke ĝi estu utila por vi kaj por la movado ĝenerale.

*(José Antonio del Barrio.HEF. 27/10/2013)*

## KIAL LA PRODUKTADA KOMPANIO DE "GRAVITY" NOMIĜAS "ESPERANTO FILMOJ".

Kiu ĉeestis la projekcion de *"Gravity"*, unu el la plej sukcesaj filmoj de la lastaj monatoj, tiu eble rimarkis ke en la finaj titoloj aperas jena mencio: *"An ESPERANTO FILMOJ Produktado"*. Tiel, en Esperanto, temas pri la nomo de la kompanio de Alfonso Cuarón, la reĝisoro de la filmo, kiu ankaŭ aperis en antaŭaj liaj verkoj, kiel "La labirinto de la faŭno".
En la retejo de HEF eblas legi la hispanlingvan version de la intervjuo kiun Cuarón respondis al Sam Green, la reĝisoro de la dokumentalo "The international language", en kiu la meksikia filmisto rakontas pri siaj simpatioj pri la internacia lingvo.

*(HEF. "La Bitbulteno". 26/11/2013)*

*Pri la afero, eblas legi en:*
*http://www.esperanto.es/hef/index.php/sala-de-prensa/noticias/42-noticias-espanol/articulo/176-por-que-la-productora-de-gravity-se-llama-esperanto-filmoj*

## Esperanto ĉe la plej granda fuĝo.

Dum tiuj ĉi tagoj oni kunmemoras la 75an datrevenon de unu el la plej grandaj fuĝoj el la historio: tiun de ĉ. 900 respublikanaj prizonuloj el la fortreso-malliberejo de San Cristóbal (Ezkaba) apud Pamplono, dum la hispana intercivitana milito (1936-1939). Estas pluraj novaĵoj pri la afero en la gazetaro.

Oni denove komentas tre interesan aferon: la ĉeforganizanto de la fuĝo, Leopoldo Picó, utiligis Esperanton por pretigi aspektojn de la organizado kun aliaj. Vidu:
http://www.deia.com/2013/05/19/politica/euskadi/quien-fue-el-enigmatico-cuarto-fugado-de-ezkaba
http://www.losfugadosdeezkaba1938.com/los-fugados/el-plan-de-los-conspiradores/

Tre impresiga dokumentalo pri la afero estas spektebla rete en:
https://www.youtube.com/watch?v=-MZnhyldn8Q

*(Toño del Barrio. 20/05/2013)*

## JAM PRETAS LA ALIĜILO AL HEF POR 2014.

Jam troviĝas en la reto la Aliĝilo al Hispana Esperanto-Federacio por la jaro 2014 http://www.esperanto.es/hef/images/PDF/Inscripcion2014eo.pdf.

Se vi ankoraŭ ne estas ano, vi povas aliĝi en iu ajn momento, sendante la aliĝilon al la adreso admin@esperanto.es. Se vi aliĝas ĝis la 15a de decembro, la Esperanto-Tago, vi ankaŭ ricevos la lastan numeron de 2013 de nia papera bulteno "Boletín".

Ĉijare la Ĝenerala Kunveno de HEF aprobis la kreadon de speciala kotizo por junuloj (malpli ol 30 jaroj), senlaboruloj kaj aliaj personoj kun ekonomiaj malfacilaĵoj. Bv. kontakti la menciitan adreson por koni la detalojn.

*(HEF. "La Bitbulteno". 26/11/2013)*

## HEF partoprenos en ĝenerala kunveno de EŬROPEANA.

Venontan 2an de decembro okazos en Roterdamo la 3a Ĝenerala Jarkunsido de la Reto Europeana, la projekto de la Eŭropa Unio por krei publikan eŭropan bitotekon konsistantan el bibliotekaj dokumentoj.

Hispana Esperanto-Federacio estis invitita kiel unu el la kolektantoj de metadatenoj, kaj Ana Manero prezentos la Bitotekon de HEF en tiu kunveno.
http://www.esperanto.es/hef/index.php/komenco/38-noticias-esperanto/noticia/196-bitoteko-en-la-kunveno-de-europeana-en-roterdamo

*(Toño del Barrio. 22/11/2013)*

## Pri la sama afero …


Bitoteko de HEF membras en "Europeana", la projekto de la Eŭropa Unio oficiale lanĉita la 20-an de novembro 2008 kiel eŭropa cifereca biblioteko, muzeo kaj arkivo: http://www.europeana.eu/

Bitoteko de HEF ankaŭ membras en "Hispana", projekto sama al tiu de Europeana, sed limigita al Hispanio: http://hispana.mcu.es/ En "Hispana" sufiĉas tajpi "Bitoteko" en la serĉilo, kaj aperos 3.895 el ties arĥivoj.

*(Darío Rodríguez. 24/11/2013)*

# DIVERSAĴOJ

## Ĉefaj lingvoj parolataj en la mondo.




*(Etsuo Miyoŝi. En "Facebook". 22-07-2012)*

# HUMURAĴOJ

Iu renkontas amikon, kiu portas tri grandajn botelojn: sur du estas skribite: "hidrogeno", sur la tria "oksigeno".
- Kial vi havas tiujn botelojn?
- Nu, mi iris al trinkejo de IKEA kaj mi petis iom da akvo...

*(Carlo Sarandrea en "soc.culture.esperanto")*

Virino aĉetas vestaĵo-ŝrankon ĉe IKEA, portas ĝin hejmen kaj muntas en la dormĉambro. Preterpasas tramo antaŭ la domo, la ŝranko komencas vibri kaj disfalas. Ŝi remuntas la ŝrankon, sed dum la venonta preterpaso de la tramo denove la ŝranko disfalas. Ŝi do decidas alvoki ĉe IKEA kaj mendi teknikiston por munti la ŝrankon.

Venas la teknikisto kaj denove muntas la ŝrankon, tute zorge. Fine li eniras la ŝrankon por iomete subteni la bretojn, kaze ke la venontatramo denove vibrigos la ŝrankon kaj disfaligos ĝin - ja ne damaĝiĝu la bretoj. Tiumomente hejmenvenas la edzo de la virino, eniras la dormĉambron, vidas la teknikiston de IKEA en la ŝranko kaj tuj demandas:

- "Kion vi faras tie ĉi?"
- "Nu", respondas la teknikisto, "vi certe ne kredos ĝin, sed mi atendas la tramon."

(*Lu Wunsch-Rolshoven*)

Inter kuracistoj:

- Kial vi havas supozitorion sur via orelo?
- Diable... nu, do, kie mi metis la skribilon?

## TRA LA MONDO …

## Nova Prezidanto de la Akademio de Esperanto.

La sveda matematikisto Christer Kiselman estas elektita nova Prezidanto de la Akademio de Esperanto. Vidu intervjuon ĉe Libera Folio:
http://www.liberafolio.org/2013/nova-prezidanto-volas-atenti-pri-nehindeuropaj-lingvoj
Vidu biografion ĉe: http://eo.wikipedia.org/wiki/Christer_Kiselman

*(Darío Rodríguez. 12/10/2013)*

## Falsaj amikoj en doktoriĝa tezo.

La pola esperantisto Maciej Jaskot doktoriĝis pri hispana filologio en la Varsovia Universitato per disertaĵo kun temo ***"La tiel nomataj falsaj amikoj de la tradukisto inter la hispana kaj Esperanto"***.
http://www.esperanto.es/hef/index.php/komenco/38-noticias-esperanto/noticia/167-doktorigo-pri-la-hispana-lingvo-kun-temo-rilata-al-esperanto

*(José Antonio del Barrio. 15/10/2013)*

## Spertulo pri eŭska ĉe Akademio de Esperanto.

Post invito, interkonsento, kaj decido fare de la estraro de la Akademio, fariĝis korespondantoj la jenaj personoj, ĉiuj eminentaj en siaj fakoj, por naŭjara periodo, de 2013-12-15 ĝis 2022-12-15.
(…)
**Wim Jansen**, profesiulo pri la eŭska kaj esperanto. Emerita profesoro en Amsterdamo.

*(Darío Rodríguez. 30/11/2013)*

## Oficialaj E-kursoj en universitatoj kaj altinstitutoj.

- Aŭstrio / Innsbruck
- Ĉeĥio / Brno
- Ĉinio / Baotou
- Germanio / Emden - Münster
- Hungario / Nyiregyhàza
- Italio / Torino
- Japanio / Minoo
- Korea Resp. / Iksan – Jukjeon/Chonan – Seoul/Yongin – Seoul/Suwon
- Kroatio / Zagreb
- Nikaragvo / Managua
- Usono / Stanford

***E-kursoj kadre de universitata asocio* (2 en 1 lando) :**
*- Britio / Liverpool - Sheffield*

Eblas konsulti la lastan kompiladon (jan. 2012) ĉe Edukado.Net,
- en la dosierujo http://edukado.net/biblioteko/dosierujo?iid=183
- en la kursejoj : http://edukado.net/kursejo
  http://egalite.hu/listo/listindex.htm

*(Germain Pirlot. 03/11/2013)*

## NOVA REDAKTORO POR LA REVUO "ESPERANTO".

Unuafoje en pli ol cent jaroj, la revuo *Esperanto* havos sian redaktejon ekster Eŭropo. La brazilano Fabrício Valle estas elektita de la Estraro de UEA por transpreni la redaktoran postenon de Stano Marček, ekde la jarkolekto 2014.

*"Jam en sia skriba sinprezento, Fabrício Valle montris grandan energion kaj kreemon, kaj krome tre realisman ideon pri la redaktora laboro"*, komentas la Prezidanto de UEA, d-ro Mark Fettes. "*Tiun impreson plene konfirmis mia telefona intervjuo kun li. Ni estas entuziasmaj pri la ideoj kaj kapabloj, kiujn li alportos al nia komuna afero".*

Valle estis unu el ses kandidatoj por la posteno de redaktoro (unu pli ol anoncite en pli frua komuniko). Movadano ekde 1970, li okupis diversajn postenojn en la brazila movado, interalie kiel prezidanto aŭ estrarano de Brazila Esperantista Junulara Organizo (1977-81), oficisto de Brazila Esperanto-Ligo (1996-2001) kaj prezidanto de la Federacia Konsilantaro de BEL (2001-04). Li ankaŭ fondis kaj gvidis propran eldon-entreprenon, Zamenhof Editores, de 1987 ĝis 1995. Lastatempe li okupiĝis pri provoj kreskigi la esperantistan ekonomion kadre de la organizo Intraespo.

La redaktoraj kapabloj de Valle estas videblaj en la ok numeroj de *Brazila Esperantisto*, kiujn li redaktis en la jaroj 2001-02. Enkondukante novan aspekton kaj novan teamon de kunlaborantoj, li kreis revuon kiu elstaris grafike, stile kaj enhave.

Ankaŭ por la revuo *Esperanto* Valle antaŭvidas proksiman kunlaboron kun talentuloj sur diversaj kampoj, cele al revuo kiu *transformiĝos en aktivan engaĝilon, en instrugazeton por trejnado de volontuloj, en heroldon de la plej bonaj iniciatoj de la movadaj organizoj tra la mondo, en gvidilon por veteranaj kaj komencantaj E-gvidantoj, en inspiron por la esperantoj*.

*(Gazetaraj Komunikoj de UEA. N-ro 519. 2013-10-16)*

## Etsuo Miyoshi.

La 12an de novembro 2013 en la Imperiestra Palaco en Tokio la japana esperantisto kaj mecenato de Esperanto Etsuo Miyoshi ricevis la Ordenon de la Leviĝanta Suno. Ĝi estis donita al li pro la kreo de la bastonvalizo *Walkin'Bag*. Etsuo Miyoshi mem rakontas pri la evento en la artikolo, aperonta en la januara kajero de *La Ondo de Esperanto* (2014) kaj jam legebla en la novaĵ-retejo *La Balta Ondo*: http://sezonoj.ru/2013/11/ordeno-2/

*(Darío Rodríguez. 21/11/2013)*

## PAPO FRANCISKO NE SALUTIS EN ESPERANTO.

Bedaŭrinde la nova Papo sendis la paskan mesaĝon nur en la itala. Ĉu Lia Papa Moŝto (la nova Papo) ne estas poligloto? Tamen la solvo al la monda lingvo-problemo brilis en la Placo de Sankta Petro sub la ĉielo de Romo. En pli ol 200 televidoj de la tuta mondo (Mundovisión) aperis plurfoje dum kelkaj sekundoj la magia verda vorto ESPERANTO. (Gratulon pro la sukceso al niaj samideanoj en Romo!)

*(Anthony Sarm Dom. 31/03/2013)*

TTT-ejo de la E-Grupo de Bilbao: esperantobilbao.tk